# OLOMOUC

## ĈEĤA RESPUBLIKO

### INFORMA GVIDLIBRO



# O L O M O U C

## URBA REZERVEJO DE MONUMENTOJ

## INFORMA GVIDILO




## ENKONDUKE PRI OLOMOUC

La unuaj pruveblaj informoj pri loĝatigo de ĉi tiu teritorio indikas, ke ĝi ekzistis jam en la tempo de neolitiko (neolitiko - la pli juna parto de ŝtonepoko antaŭ ĉirkaŭ 11 000 jaroj). Tiam ĉi tie Slavoj ankoraŭ ne estis konataj. La unuaj dokumenteblaj sciaĵoj pri terkulturado de slavaj gentoj estas el la sesa jarcento post Kristo. El ĉi tiu tempo ekzistas multaj arĥeologiaj trovaĵoj de domaroj en lokoj de la hodiaŭa urbocentro.

Areo de la urbo: 10 337 hektaroj

Nombro de loĝantoj (fine de 2003): 101 268

## HISTORIO DE LA URBO EN DATOJ

**1017** - Alligo de Moravio al la bohemia premislida ŝtato kaj postsekva konstruado de olomouca burgo pere de la unua apanaĝa premislida princo Břetislav.

**1239 - 1246** - Verŝajna dato de ekesto de la reĝa urbo Olomouc.

**1306** - En la domo de kapitula dekano estis murdita la lasta Premislido - la reĝo Václav la III-a.

**1352** - Laŭ la privilegio de margrafo Jošt la urbo Olomouc estis deklarita ĉefurbo de Moravio.

**1469** - Hungara reĝo en la katedralo de Sankta Venceslao estis proklamita ĉeĥa reĝo.

**1573** - Altigo de olomouca akademio je universitato, laŭvice la dua en la ĉeĥaj landoj.

**1655** - Olomouc proklamita fortikaĵa urbo laŭ la decido de imperiestro Ferdinando la III-a.

**1762** - Imperiestrino Maria Theresia pravigis privilegion uzi la titolon reĝa urbo.

**1767** - Dekunujara Wolfgang Amadeo Mozart en Olomouc komponis la 6-an simfonion F-dur.


**1777** - Altigo de la episkopejo je ĉefepiskopejo.

**1848** - Portempa lokigo de la imperiestra kortego el Vieno al Olomouc, surtronigo de la imperiestro Francisko Jozefo la I-a.

**1919** - Estigo de t.n. granda Olomouc per kunigo de du urboj kaj 11 vilaĝoj al la urbo Olomouc. (Du urboj: Hodolany kaj Nová ulice. Dekunu vilaĝoj: Bělidla, Černovír, Hejčín, Chválkovice, Lazce, Nové Sady, Nový svět, Neředín, Pavlovičky, Povel kaj Řepčín.) Nuntempe ili estas kvartaloj de la urbo.

**1971** - Olomouc proklamita urba rezervejo de monumentoj.


**2000** - Baroka kolono de la Plej Sankta Triunuo proklamita je "Monda heredaĵo de Unesco".



*La Urbodomo kun statuaro de la Plejsankta Triunuo sur la Supra Placo*

## VIZITINDAJ OBJEKTOJ

En la urbo Olomouc estas vizitindaj multaj arĥitekturaj monumentoj, unuavice la **katedralo de Sankta Venceslao** - rekonstruita 1883-1889 laŭ la projekto de G. Marett kaj R. Völkel, plue la romanika t.n. **Premislida palaco**, kapitula dekanejo - duala baroka edifico kun honora korto.



*La katedralo de Sankta Venceslao*

**La ĉefepiskopa palaco** el 1665-1685 - unu el impone konstruitaj palacoj de Olomouc, famiĝis pro surtronigo de la aŭstria imperiestro Francisko Jozefo la I-a dum kvinmonata translokigo de aŭstria imperiestra korto en urbon Olomouc.

**Moravia filharmonio** jam pli ol kvindek jarojn aktivas kaj organizas internaciajn festivalojn, muzikan printempon de Olomouc. Tiu ĉi internacia festivalo enhavas eksterordinare ampleksan repertuaron.

**Muzika teatro** estas kun la muzeo de arto en la sama domo. La muzika teatro kun 120 komfortaj seĝoj ne havas specialan interpretan kolektivon, tamen ĝi elektas kaj ofertas la plej bonajn muzikajn programojn.

**Muzeo de arto** kun 60 mil kolektaĵoj estas unu el la plej grandaj tiuspecaj institucioj en nia lando.

**Universitato de František Palacký** estas la plej malnova universitato en nia lando post la universitato en Prago. En jaro 1573 estis akademio altigita je Universitato. En jaro 1860 estis universitata instruado rompita kaj renovigita post dua mondmilito en jaro 1946.


**Patrujscienca muzeo** funkcias ekde la jaro 1951. En ĝi troviĝas geologiaj, mineralogiaj, zoologiaj ekspozicioj kaj dokumentoj pri praepoko de olomouca regiono en pasintaj jarcentoj.

**Galerioj:** Galerio de Caesar, Galerio G, Galerio Mona Lisa, Galerio Etaĝo (ĉeĥe: Patro).



*La Ĉefepiskopa Palaco - unu el impone konstruitaj palacoj de Olomouc*

# EKSPOZICIOJ PRI DEKORA HORTIKULTURO FLORA OLOMOUC



*Hortikultura ekspozicio Flora Olomouc*

**Urbaj parkoj** ĉirkaŭas la malnovan historian urbon kaj kunligas ĝin kun la modernaj kvartaloj kon-struitaj post la dua mondmilito. Sistema fondado de urbaj parkoj komenciĝis post likvido de la urba fortikaĵa sistemo en la jaro 1879.

**Parko de Smetana** - fortikaĵaj areoj estis priplantitaj per arboj kaj en la jaro 1832 en ĝi ekestis aleo nomita "Aleo de Rudolf". Ĝi estis detruita antaŭ la Prusia-Aŭstria milito. Tamen en la dua duono de 1866-a jaro ĝi estis renovigita.

**Parko de Čech** - estis fondita en la tridekaj jaroj de la 19-a jarcento. Aleo nomita "Aleo de Janský" memorigas konatan ĉeĥan kuraciston. La nomo "Parko de Čech" estas konata de jaro 1918.

**Parko de Bezruč** estis fondita en la jaro 1898 per hortikulturaj laboroj kaj ĝia ekfunkcio datiĝas de la jaro 1902.

**Botanika ĝardeno** - netradicia rozĝardeno sur 3,5 hektara areo ekzistas ekde la jaro 1970. En la ĝardeno estas plantitaj pli ol 300 specoj de rozoj, entute 15 mil arbustoj de eksterlanda kaj ankaŭ enlanda produkta deveno.

**Zoo** troviĝas en la antaŭurbo Svatý Kopeček (Sankta Monteto), en konifera arbaro ampleksa 42,5 hektarojn. Vivas tie pli ol 300 specoj de bestoj.

Eksterordinara intereso de loĝantoj kaj gastoj de la urbo Olomouc pri ĝiaj historiaj monumentoj estis unu el kialoj por aperigi tiun ĉi informan publikaĵon. La urbo Olomouc estas ja post Prago la dua urba arĥitektura tuto de eksterordinara valoro kaj iama socia signifo.

La celo de tiu ĉi publikaĵo estas per konciza faktografia formo konatigi interesatojn pri la plej gravaj monumentoj kaj memorindaĵoj de Olomouc kaj doni pri ili bazajn informojn. Dum la prilaborado ni konsideris linion, laŭ kiu kutime iras karavanoj gvidataj de ĉiĉerona servo. Interesiĝantojn dezirantajn pli detale konatiĝi kun la kulturo kaj historio de Olomouc, aŭ ekkoni historiajn monumentojn ĉi tie nemenciitajn, ni atentigas pri literaturo eldonita en la lastaj jaroj. La jam disvenditajn eblas pruntepreni en publikaj bibliotekoj.

De post la jaro 1918 - post akiro de la ŝtata memstareco - sed precipe de post la jaro 1945 Olomouc diskreskis ne nur laŭ la nombro de la loĝantoj, sed ankaŭ laŭ vasta loĝeja, socia kaj industria konstruado.

# SUPRA PLACO

Trarigardo de la plej signifaj monumentoj de Olomouc komenciĝas kutime sur unu el la plej vastaj placoj, kiu estas nomata la Supra Placo. En ĝia centro staras la urbodomo, grava monumento de sekulara mezepoka arĥitekturo. Ĝi estas vasta, esence gotika trietaĝa edifico kun korto kaj turo. Ĝia konstruado estis komencita surbaze de promeso, kiun en novembro 1378 donis al la urbo ties feŭda mastro, la moravia margrafo Jošt.

La objekto estis konstruita laŭetape en 1378-1607. En 1443, kiam finiĝis la unua etapo, estis jam preta la orienta parto de la konstruaĵo - la urbodomo mem - kaj la okcidenta parto, servanta kiel foirejo. En la dua etapo, komencita en 1474, estis antaŭ la suda alo antaŭkonstruita alia domparto kaj la objekto plialtigita pri la tria etaĝo.
Dum la tria etapo, en 1529-1607, estis rekonstruita la tuta orienta alo. Ĉirkaŭ 1530 ĉe tiu



*La Urbodomo sur la Supra Placo de Olomouc*

ĉi flanko estis starigita dubranĉa ŝtuparo kun belega portalo, tra kiu oni rekte eniris en konsiliejon. La Portalo estas verko de nekonata norditala skulptisto. La ŝtuparo estis rekonstruita en 1588-1591. En Olomouc ekloĝinta Hans Jošt tiutempe ornamis ĝin per loĝio kun tri arkoj.

Ĉirkaŭ 1560 en la dua etaĝo de la norda alo estis konstruita granda salono, destinita por kunvenoj de la urbanaro. Hodiaŭ en ĝi okazas solenaj ceremonioj. La kapelo de Sankta Hieronimo el 1444 estis rekonstruita jam en 1488-91. Ĝia orielo elstaranta el la suda



*Statuaro de la Plejsankta Triunuo estas ekde la jaro 2000 envicigita inter memoraĵojn de Unesco*

fronto de la urbodomo, ekipita per ornamaj plastikaj maskoj, estas el 1501. En la interno de la kapelo konserviĝis origina gotika kaj frurenesanca murkolorigaĵo. Inter 1601-07 estis altigita la urbodoma turo al la hodiaŭaj 75 metroj.

Per pseŭdogotika adapto de la norda alo en 1902-04 estis rompita la unueca aspekto de la objekto. Kiel dekora ekipo de la norda alo estas astronomia horloĝo. Ĝi estis instalita fine de la 15-a jarcento kaj ĝia aspekto kelkfoje ŝanĝiĝis. La lasta adapto kun mozaiko proponita de Karel Svolinský kaj farita kiel mozaiko finiĝis en 1955. La meĥanismon de la astronomia horloĝo rekonstruis la olomouca horloĝa majstro Konrad Schuster. Hodiaŭ oni eniras en la urbodomon tra la okcidenta alo. Super la enirejo estis konstruita ŝtuparo kun balkono, nove adaptita meze de la 18-a jarcento. Apud la urbodoma enirejo, super volbita niĉo, estas enmetita ŝtona tabulo kaj skulptaĵo de Higiea, verko de la olomouca skulptisto Karel Lenhart el 1948.

Riĉan historion havas pliparto de la domoj borderantaj la kvar flankojn de la Supra Placo. La nomoj de la estintaj ofte elstaraj posedantoj estas konstateblaj en la t.n. "kroniko de la domoj", manuskripto kompilita de la urbano Vilém Nather. En kernoj de multaj domoj konserviĝis restaĵoj de gotikaj keloj, gotika masonaĵo kaj ŝtona listelaro. La postaj rekonstruoj de la domoj estis realigitaj ĉefparte post grandaj incendioj de la urbo, precipe post la incendio en 1709.

Ĉe la okcidenta flanko de la placo, sur kvaretaĝa domo n-ro 21 (la hodiaŭa kafejo Opera), estas sabloŝtona reliefa tabulo rememoriganta la pactraktadojn de la ĉeĥa reĝo Vladislav la II-a Jagelona kaj la hungara reĝo Matias Korvin en la jaroj 1478 kaj 1479. Ambaŭ regantoj ĉi tie kontraktis, ke Moravio restos sub la regado de Matias kaj post lia morto ĝi estos redonita al Bohemio kontraŭ kompenso de 400 000 dukatoj. En 1490, post la morto de Matias, fariĝis Vladislav la II-a hungara reĝo kaj li denove kunligis Moravion kun Bohemio. La hodiaŭa edifico, konstruita en 1834, havas empiran fronton kun klasikisma portalo.

Ankaŭ la najbara domo de la hodiaŭa Moravia teatro Olomouc, n-ro 22, estas empira objekto el 1827-30, projektita de Josef Kornhäusel sur loko de la domo de fortresa estro. En la teatro estas ankaŭ koncerthalo Reduta, administrata de direkcio de la Moravia filharmonio.




*Palaco de Edelmann, antaŭe fontano de Herkulo*

Apud la enirloko en la mallarĝan Svedan strateton oni vidas t.n. Petráš-palacon, n-ro 25, barokigitan post 1725. Unu el ĝiaj posedintoj, Jozefo, la libera mastro Petráš, ĉi tie en 1746 fondis doktan societon, la plej malnovan en la Habsburga monarkio - "Societas incognitorum". El la pli frua renesanca palaco konserviĝis duetaĝaj arkadoj en la korta alo. Lukse impresas la palaca ŝtuparo dekorita per plastikaĵoj kaj cizelaĵoj.

La hodiaŭa aspekto de la najbara trietaĝa baroka palaco, n-ro 26, originas el la unua kvarono de la 18-a jarcento. La fasado, dividita per alta pilastraro, estas finita per atiko kun ses bustoj de mitologiaj figuroj. Fronton de la palaco ornamas ŝtona blazono de la familio Podstatský el Prusinovice. En 1910 estis la domo, pli frue nomata "Ĉe verda arbo", rekonstruita kaj en ĝi kreita trairebla vendej-pasejo, kunliganta la placon kun la strato de Libereco.

Al la Supra Placo faŭkas la strato de Rieger, en kiu rimarkindas la domo n-ro 19 el fino de la 16-a jarcento kun ornamita orielo kaj ŝto na portalo. Ekde 1662 estis en la domo establita la unua olomouca perĉevala poŝtejo. Ĝi estis la unua poŝtdomo en la urbo.

Lime de la 17-a kaj la 18-a jarcentoj sur loko de tri domoj estis konstruita monumenta palaco, n-ro 1, por la grafo Julius Salm. Partan rekonstruon de la domo en 1728 partoprenis la kon-




*Akvofontano de Caesar sur la Supra Placo*

strumastro Wolfgang Reich. La fronto de tiu ĉi plej granda palaco en Olomouc direktiĝas al la Supra Placo, unu ĝia alo sin turnas al Rieger-strato, la alia al la strato de La 28-a de oktobro. En 1792 estis la domo adaptita laŭ klasikisma stilo kaj plialtigita je la kvara etaĝo.



*Supra Placo de Olomouc nokte*

En la komenco de la strato de La 28-a de oktobro, kontraŭ la norda fronto de la urbodomo, staras belega Edelmann-palaco, n-ro 5. Oni ĝin konstruis post 1572 en la stilo de la itala renesanco elspeze de la riĉa urbano Václav Edelmann el Brosdorf. La fronton pompigas portalo, loĝioj en ambaŭ etaĝoj, kiuj estis masonfermitaj en 1870-1871. Iliajn parapetojn plenigas reliefoj kun malnovtestamentaj kaj novtestamentaj motivoj, modelitaj laŭ grafikaj modeloj de germanaj artistoj. Aŭtoreco de la plastika ornamo estis atribuita en paseo al la olomouca italdevena skulptisto Giorgio Gialdi, arthistoriistoj tamen konjektas ĝin laboro de ŝtontajlistoj-skulptistoj de la nordgermana skolo.

Antaŭ la palaco troviĝas la fontano de Herkulo, kies barokan statuon kreis en 1687-1688 la skulptisto Michal Mandik el Gdańsk. Ĝi estis transportita ĉi tien en 1716, por liberigi lokon por konstruo de baroka kolono de la Sankta Triunuo.

Ĉi tiu ŝtona kolono, 32 metrojn alta, estis konstruita en 1716-1754. La iniciaton por ĝia konstruo donis kaj mem ĝis la alto de la dua etaĝo ĝin konstruis la olomouca ŝtonskulptista majstro Václav Render. Ses reliefojn de duonfiguroj de apostoloj skulptis Filip Sattler. Post la morto de Render en 1733 kontinuigis la skulptajn laborojn František Thoneck, Jan Václav Rokycký, lia filo Jan Ignác kaj Augustin Schulz. La statua ornamo de eminenta kvalito estas verko de la skulptisto Ondřej Zahner. Dum neplenaj sep jaroj li faris 18

statuojn de sanktuloj, 12 figurojn de lumportistoj kaj 6 reliefojn kun duonfiguroj de apostoloj en la tria etaĝo de la kolono. Li modelis ankaŭ la statuaron Ĉieliro de Virgulino Maria kaj la pinte lokitajn plastikaĵojn. Ili estis cizelitaj en kupro kaj orumitaj fare de Šimon Forstner. Etajn finigajn skulptolaborojn partoprenis fine ankaŭ Jan Michal Scherhauf. La baroka kolono kaj ĝia plastika ornamo apartenas al la plej belaj kaj la masivaj kolonoj ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en la tuta Eŭropo.

Daŭrigante la trarigardon de la placo ni preterpasas enfluon de du stratoj, de Opletal-strato kaj Ostružnická-strato. Je la dekstra angulo de la lasta staras domo de la Regiona apoteko, n-ro 10. La empira fasado estas el la unua triono de la 19-a jarcento. La apotekista tradicio konserviĝas en la domo ekde 1571. Listo de la vico de domposedantoj estis gravurita sur la ŝtonplankon en teretaĝo.

La najbara domo, n-ro 11, estis projektita en 1931 fare de Klaudius Madimayer por la Agrara Instituto. Antaŭ la domo staras la plej fama kaj ankaŭ la plej granda el ĉiuj ses olomoucaj fontanoj, la Fontano de Caesar. La rajdstatuon de la legenda fondinto de Olomouc, Julius Caesar, kreis en 1725 kiel sian majstroverkon Jan Jiří Schauberger.

La edifico de la estinta Parcela Instituto formas angulon kun la Ztracená-strato, en kiu situas tri rimarkindaj domoj. Ĉe la enirejo en la menciitan straton staras palaco de la malnova moravia gento Podstatský el Prusinovice, n-ro 2, devenanta el la tempo post 1709. Ĝia portalo estas hodiaŭ plenigita per masonaĵo. En la apuda trietaĝa baroka domo, n-ro 4, nomita Ĉe Ora Ezoko, loĝis en 1883 la direktoro de la urboteatra orkestro la komponisto Gustav Mahler. La domo n-ro 10, meze de la stratlongo, kun mal-frurenesanca portalo, apartenis en 1722-77 al la pentristo J. K. Handke.


*Baroka fronto kaj portalo de domo nomita Ĉe Nigra Hundo*

La sekvan sudorientan parton de la placo formas fronto de luksaj konstruaĵoj, el kiuj apartan atenton meritas la domo n-ro 12, kun baroka fronto kaj portalo, nomita Ĉe Nigra Hundo, kie estis drogvendejo kun la sama nomo, kaj plue la baroka urbana domo n-ro 15, sur kies atiko estas lokitaj sep bustoj de mitologiaj estaĵoj el la unua triono de la 18-a jarcento. Ĉambro en la dua etaĝo havas cilindre volbitan plafonon kun unika stuka dekoro el 1740-1750.

## MALSUPRA PLACO

La angula trietaĝa domo Ĉe Ora Cervo, la Malsupra Placo n-ro 1, kun rondforma orielo ornamita per plastikaĵo de cervo, per unu fronto apartenas ankoraŭ al la Supra Placo, per la alia jam al la Malsupra Placo. El la gotika epoko konserviĝis en la domoj keloj kaj kelkaj spacoj en la teretaĝo.



*La trietaĝa domo Ĉe Ora Cervo sur angulo de la Supra kaj la Malsupra Placoj*

La mallarĝigita trairejo el la placo Supra en la placon Malsupran nomiĝis Butikista strato, ĉar tie ĉi estis koncentritaj domoj de la plej riĉaj olomoucaj komercistoj. Tio validas ĉefe pri la supra flanko, kie estas altaj, luksaj, entute kvaretaĝaj domoj. Iliaj iamaj arkadoj dum rekonstruoj masonfermitaj nun laŭvice renoviĝas. Laŭ konstrua nivelo la plej valoraj estas la domoj n-roj 7 kaj 9. La unua havas riĉan barokan fasadon, faritan ĉe rekonstruo fine de la 18-a jarcento. En la dua etaĝo hodiaŭ estas ekspoziciejo de Kabineto de grafiko, ĝiaj pentritaj lignaj plafonoj estas el la 17-a kaj la 19-a jarcentoj. La komercista domo, n-ro 9, en la 16-a jarcento apartenis al la olomouca skulptisto Giorgio Gialdi. En la menciita jarcento ĝi estis rekonstruita en renesanca stilo, la fronto estis nove adaptita fine de la 18-a jarcento.

Ĉe la malsupra flanko de la estinta Butikista strato ni rimarku la domon n-ro 51 kun novklasikisma fronto, en kiu estas la apoteko Ĉe Salvátor. Laŭdire ĉi tie estis apoteko de ĉiam. En 1680 ĝi estis nomata Ĉe Ora Pelikano.

La pli sube situanta domo Ĉe Nigra Ĉevalo, n-ro 44, estis rekonstruita meze de la 18-a jarcento. Al la reliefo de ĉevala kapo sur la fronto de la domo ligiĝas legendo pri servistino, rajdanto kaj lia "enamiĝinta" ĉevalo. Post fortrinko de "amtrinkaĵo" la ĉevalo persekutis la servistinon tra la tuta domo, ĝis ĝi enblokiĝis en la mallarĝa fenestra aperturo.




La akvofontano Neptuno, malantaŭe domo Ĉe Nigra Ĉevalo

En la malsupra parto de la placo kaptas la atenton la domo n-ro 40, la t.n. vianda butiko. Ĝi estis konstruita en 1586kiel teretaĝa duala domo, enkuranta profunden en la kortan areon. En la dua duono de la 18-a jarcento super ĝi estis surkonstruitaj du etaĝoj. Pere de la dubraka ekstera ŝtuparo estis alirebla salono en la dua etaĝo, kie en 1770-1830 funkciis konstanta teatra scenejo.



La Pesta Kolono de la Virgulino Maria

Ĉe la angulo de la Lafayett-strato troviĝas unu el la plej pompaj olomoucaj domoj, la renesanca palaco, n-ro 38, kiun post 1583 konstruis la riĉa vinokomer- cisto Matias Hauenschild el Fürstenfeld. El la origina edifico restis riĉe ornamita portalo kun plastikaĵoj de kavaliroj, defendantoj de Bohemio kaj Moravio kaj kun la angula duetaĝa orielo provizita per reliefa ornamaĵo en ambaŭ etaĝoj. Tie ĉi estas plastike prilaboritaj kelkaj motivoj el "Metamorfozoj" de Ovidio. Aŭtoreco de la skulptisto Giorgio Gialdi estas hodiaŭ kontestata. Same kiel ĉe la Edelman -palaco, ankaŭ ĉi tiu ornamo estas aljuĝata al nekonataj skulptistoj de la



*La renesanca palaco ĉe Lafayett-strato*

palaco estis surkonstruita en la 80-aj jaroj de la 19-a jarcento.

Ĉe la malantaŭa parto de la malsupra domfronto estas enirejo en la straton U tržnice (Apud foirejo). En ĝia dekstra flanko estas atentinda la ununava gotika preĝejo de Sankta Katarina kaj la baroka dominikana monaĥejo. La virina ordeno de dominikanoj en Olomouc kaj ilia monaĥeja preĝejo estis menciitaj unue en 1287. Tamen la kerno de la hodiaŭa kirko devenas el la dua kvarono de la 14-a jarcento, kiam la objekto estis rekonstruita. Post la incendio en 1709 ĝi estis parte barokigita kaj en 1848 regotikigita. En 1709 sur renesancaj fundamentoj estis konstruitaj la nuntempaj monaĥejaj objektoj. En 1784 la monaĥejo estis transdonita al ursulaninoj. Rimarkindan lignoskulptistan laboron prezentas la enirpordo de la kirko el la tria kvarono de la 17-a jarcento.

Fronte al la preĝejo de Sankta Katarina estas alirejo al la malgranda Blazia Placo, kie ĉirkaŭ la kirko de Sankta Blazio troviĝis aĉetista-metiista setlejo jam en la 11-a jarcento. La preĝejeto karakteriza pro interesa horizontala plano estis malkonstruita en 1839.

En la supra angulo de la Malsupra Placo, ĉe ties sudorienta flanko, super ŝtuparo, staras simpla baroka preĝejo de Anunciacio de la Virgulino Maria, konstruita por kapucenoj en 1655-1661. La konstruaĵo havas glatan fronton kun triangula gablo. Ekde 1975 la fronton ornamas mozaiko de la akademia pentristo Karel Benedík el Veselí nad Moravou. Konata viena pentristo Tobias Pock estas aŭtoro de la olea bildo sur la ĉefa altaro, devenanta el la dua duono de la 18-a jc.




*Kapucena preĝejo de Anunciacio de la Virgulino Maria kaj akvofontano de Jupitero*



Gotika preĝejo de Sankta Katarina

Vastan placon pliĉarmigas tri barokaj skulptaĵoj. Proksime de la Panská-strato situas la fontano de Neptuno, la plej malnova el la olomoucaj fontanoj. La statuaro estas verko de Michal Mandik el 1683. En la centro de la placo estis konstruita en 1716-1723, laŭ projekto de la ŝtonskulptisto Václav Render, la pesta kolono de Virgulino Maria. La tajlo-laborojn realigis la grupo de Render. Aŭtoroj de la skulpturaj kompletoj estas Jan Sturner kaj Tobiáš Schütz, al kiu estis atribuitaj ses el naŭ statuoj. Ekde 1986 estas la kolono kaj la statuoj komplete riparitaj. Proksime de la sudorienta dom-fronto situas fontano, kiu en 1706-1707 estis konstruita kaj provizita per statuo de Sankta Floriano. La ŝtontajlaĵojn kaj la statuon aŭtoris Václav Render. En 1735 estis la statuo de la sanktulo translokita en Skrbeň kaj la fontano provizita per statuo de Jupitero skulptita de Filip Sattler.

Ĉe la supra orienta fronto de la Malsupra Placo, tra abrupte ascendanta Panská-strato, oni eniras al la Placo de Žerotín. Ĉe la angulo de tiu ĉi strato staras du luksaj palacoj, dekstre la palaco de Jiří Zikmund el Zastřízly, kiu devenas el la unua triono de la 17-a jarcento (Malsupra Placo n-ro 14), maldekstre urbana domo n-ro 13 kun glata loĝio, mansarda tegmento, fronto rekonstruita en la 19-a jarcento kaj novtempe adaptita arkado. Tra la Panská-strato veturadis nobelaro al sesioj de landa deputitaro kaj landa tribunalo. La sesioj okazadis en la dominikana monaĥejo, al kiu apartenas la templo de Sankta Miĥaelo. Maldekstre en Panská-strato troviĝas granda urbana domo n-ro 3, kiu estas konstruita sur fundamentoj de kvar malnovaj objektoj. Post 1709 ĝi estis rekonstruita. Ĝia pseŭdohistoria fasado estas el 1860-aj jaroj.



Preĝeja portalo de S-ta Katarina

## PLACO DE ŽEROTÍN

La Placo de Žerotín, okupanta verton de roka altaĵo, la plej alta punkto de Olomouc, ricevis la nomon laŭ la konstruinto de la ampleksa renesanca palaco en Purkrabská-strato, n-roj 2 kaj 4, Karel starší el Žerotín. La palaco estiĝis per rekonstruo de du domoj ĉirkaŭ 1610. Unu angulo de la domo situas apud la Placo de Žerotín, sed la tuta fronto tamen estas turnita en la mallarĝan Purkrabská-straton. En la trairejo konserviĝis blazona ŝildo de Bedřich Žerotín kaj lia edzino, idino de Slavata-gento el Chlum kaj Košumberk, kies ŝildo devenis el 1595-1601. La domo havas fortikan renesancan portalon kaj arkadan korton. Dum tri jarcentoj la palaco ŝanĝis kelkajn posedantojn, hodiaŭ ĝi estas posedaĵo de la seminario de la Teologia Fakultato de Palacký-Universitato.



*Katolika porpastra seminario kaj preĝejo de Sankta Miĥaelo sur Placo de Žerotín*

La sama fakultato estas posedanto de la vasta objekto situanta angule de Placo de Žerotín kaj Purkrabská-strato, konstruita en 1911-1914 por pastra seminario. En la dua etaĝo nun estas aŭlo de la universitato, ekipita per fenestraj vitraloj de Antonín Strnadel. Tiu ĉi pli nova domo najbaras al la edifico de eksa dominikana monaĥejo, kies rekonstruon por la celo de pastra seminario en la 1840-aj jaroj proponis la arkitekto Antonín Arche. Atentinda estas lia koncepto de la portiko, la kolona antaŭkoridoro kun plata tegmento estis konstruita antaŭ la fronto de la domo.

Al ĉi tiuj objektoj algluiĝas dominanto de la placo kaj ankaŭ dominanto de la tuta urbo, la trikupola templo de Sankta Miĥaelo. La origina frugotika konstruaĵo el la 13-a jarcento estis rekonstruita en 1673-1699 laŭ la projekto de la arĥitekto Giovanni Pietro Tencalla kaj de Domeniko Martineli en 1703-1706. Prisma turo de la sonorilejo laŭ surskribita indiko datiĝas al la jaro 1482.

En niĉoj de la fronto estas du skulptaĵoj de Ondřej Zahner, elfaritaj ĉirkaŭ 1730. Antaŭ la norda flanka muro de la templo staras kvar barokaj statuoj, verkoj de Jan Michal Scherhauf el la dua duono de la 18-a jarcento, transportitaj ĉi tien en 1904 el la strato Nová Ulice.

La ĉefan altaron kaj la predikejon en la interno de la templo faris Jan Kammereit. La lignaj skulptaĵoj de apostoloj sur pilastroj de la navo estas atribuataj al Augustin Jan Thomasberger. El orgeno, translokita ĉi tien el la malnova templo de Virgulino Maria en la Monaĥejo Hradisko, konserviĝis lignotranĉita ornamo, kies aŭtoro estas la skulptisto Jan Sturner, forminta ĝin en 1706. El la dua duono de la 14-a jarcento devenas la klostro juntiĝanta al la templo ĉe ĝia dekstrafronta flanko. En ĝi estas dismetitaj altaroj kaj skulptaĵoj precipe el la baroka tempo kaj dislokitaj grandareaj oleaj pentraĵoj de Ignác Raab el la dua duono de la 18-a jarcento. Al la klostro estas alligita la kapelo de Sankta Aleksio, fondita laŭindike en 1380 fare de Václav el Doloplazy. El tiu tempo konserviĝis volbo de sacerdotejo kaj la enireja portalo. Volbo de la navo falis en 1845. En la sacerdotejo de la kapelo troviĝas ŝtona epitafo do Johann Eibenstock el 1524.



*Kapelo de Sankta Johano Sarkander*

Fronte al la alo de la estintapastra seminario staras vico de komercistaj kaj metiistaj domoj konstruitaj en la renesanca aŭ baroka stiloj en la 16-a ĝis la 18-a jarcentoj. En pliparto de ili restis malnovaj laŭtempaj foirejoj, kie oni iam vigle komercis. En la dua etaĝo de la domo n-ro 8 estis malkovrita kaj restaŭrita ligna pentrita plafono. Pentritan plafonon havas ankaŭ teretaĝa ĉambro en la najbara domo n-ro 9.

Antaŭ ol forlasi Placon de Žerotín, ni trarigardu la barokan skulptaĵon de Sankta Floriano el 1728, faritan de Jan Jiří Schauberger. Ravas nin elrigardo ankaŭ al la Supra Placo kaj rigardo malantaŭ la preĝejon, al la malnova turo kun tegmentita ŝtuparo, al la t.n. Miĥaela atakbastiono, kie troviĝas mezepoka juda pordeto, elirejo el la urbo, destinita sole por juda loĝantaro de la proksima getto.



*Iama seminario de Francisko Ksavero, nune apartenanta al Fakultato de Palacký-Universitato*

En la apuda strateto Na hradě (Ĉe burgo), en la maldekstra flanko, staras novbaroka kapelo de Jan Sarkander, konstruita en 1909 -1912 laŭ la projekto de arĥitekto Edvard Sochor. Ĝi troviĝas surloke de malliberejo, en kiu en 1620, post kelkfoja torturo, mortis la pastro de Holešov Jan Sarkander, en 1860 proklamita beata kaj en 1995 (la 21-an de majo) kanonizita de la papo Johano Paŭlo la II-a. La kapelon mur-pentris Jano Köhler. La plafona pentraĵo super la altaro estas verko de Jakub Obrovský.

Dekstraflanke de la strato situas alo de fortika baroka edifico, iama seminario de Francisko Ksavero. En ĝi estas aŭditorioj de la Pedagogia fakultato de Palacký-Universitato, ĝia fronto direktiĝas al la malgranda Universitata Placo. La baroka edifico estiĝis en 1717-1720 per rekonstruo de la origina domo el 1675. Laŭ planoj de Lukáš Glöckel adaptis ĝin Wolfgang Reich. Ĉe la enirejo estas reliefa tabulo farita de Bohumil Teplý, rememoriganta, ke en la malnova olomouca altlernejo en 1840 - 43 studis la fondinto de genetiko Gregor Mendel. La placon kontinuigas la Universitata strato, en ĝia dekstra flanko etendiĝas vasta komplekso de la malnova jezuita konvento, kies projektanto kaj konstruanto estis olomouca masona majstro kaj konstruisto Petr Schüler en 1660-1667. Tio estas la plej malnova jezuita objekto en Olomouc. Ĝia fronto estas dividita per kolosa pilastra vico.

La trietaĝa domo de la nova konvento, kies projektanto kaj konstruanto estis en 1721-1724 Jan Jakub Kniebandl, plenigis la breĉon inter la malnova konvento kaj lernejo el 1701-1708, al kiu estis post kvar jaroj alkonstruita la kirko de Virgulino Maria Neĝa. En la novan konventon estis enkonstruita la kapelo de Krista Korpo sur elipsa plano, kun fresko sur la volbo fare de Jan Kryštof Handke kaj kun plastika ornamo de Filip Sattler.

## PLACO DE RESPUBLIKO

La Placon de Respubliko apartigis de la nuntempa Denis-strato la Nova Pordego, kiu estis forigita en 1786. Ĉiujn flankojn de la placo ĉirkaŭas masivaj konstruaĵoj. En ĝia centro troviĝas la Fontano de Tritonoj el 1709, kiu staris ĝis 1890 sur la vojkruciĝo de tri stratoj: Denis-strato, Ztracená-strato kaj Ostružnická-strato. La skulptista parto de la fontano estas verko de Václav Render, la statuaro mem estas atribuata al nekonata skulptisto, laboranta tiam en la laborejo de la menciita Render.




*Patrujscienca Muzeo de Olomouc*

Apud la alirejo en la Placon de Respubliko staras la baroka kirko de Virgulino Maria Neĝa, monumenta hala konstruaĵo el 1712-1719, konstruita fare de Lukáš Glöckel laŭ planoj de la sileziano Michael Klein el Nisa. La interna dekoracio estis finita nur en 1743 kaj faris ĝin kelkaj pentristoj, skulptistoj, stukistoj kaj oraĵistoj, el kiuj estas menciindaj la aŭtoro de la fresko sur volbo en la pastrejo kaj en la navo Karel František Haringer, la pentristo Josef Wickart, pentrinta la altarajn bildojn de Karlo Boromeo kaj de la arĥianĝelo Miĥaelo, la pentristo Jan Jiří Schmidt, kiu pentris tri altarajn bildojn, nome por la ĉefa altaro kaj ankaŭ por la flankaj altaroj de Sankta Anna kaj Sankta Paŭlina.



*Fontano de Tritonoj*

El la pluaj valoraĵoj de la kirko rimarkindas la gotika skulptaĵo de Madono el la 1380-aj jaroj, la malfrugotika kruco lokita antaŭ la kirko, el la tempo ĉirkaŭ 1500, la tomboŝtono de la episkopo Vilém el Prusinovice, situanta en la flanka kapelo apud la ĉefa altaro, el 1572, lignogravurita ornamo de la orgeno, kies meĥanismon en 1728-1730 pretigis Jan Gottfried Halbich el Králíky, kaj la rokoka inkrustita meblaro en la sakristio. La iama jezuita templo estas hodiaŭ posedaĵo de la urbo kaj ĝia interno estas laŭvice renovigata kaj kompletigata.

Samtempe kun tiu templo jezuitoj komencis konstrui ankaŭ dominanton de la placo, kolegion konsistantan el kvaretaĝaj domoj ĉirkaŭantaj du kortojn. La konstruo okazis en 1711-1722, verŝajne laŭ projekto de G. P. Tencalla, korektita de Lukáš Glöckel. Post lia morto la konstruon gvidis Wolfgang Reich kaj en la fina konstru-fazo oni supozas partoprenon ankaŭ de la fama ĉeĥa arĥitekto Kilián Ignác Dienzenhofer, al kiu oni atribuas precipe koncepton de la ĉefa fasado direktita al la placo.

En la kontraŭa flanko de la placo staras la monaĥejo de klaraninoj kun la estinta kirko de Sankta Klara. La komplekso de la monaĥejaj domoj estis konstruita ĉirkaŭ la jaroj 1754-1770 fare de la konstruisto Matěj Kniebandl, filo de la konata konstruisto Jan Jakub. Post finkonstruo de la monaĥejo oni komencis rekonstrui la malnovan gotikan kirkon. La projekton de la nova konstruo ellaboris Václav Beda. Sed en la jaro de finkonstruo, en 1782, estis la ordeno malfondita. La spaco de la kirko estis poste plenigita per bibliotekaj ŝrankoj kun libroj de la tiama licea biblioteko. La vizitantoj de la biblioteko, inter ili ankaŭ Josef Dobrovský, venadis ĉi tien ĝis 1807 (li mortis la 6-an de januaro 1829). Hodiaŭ apartenas



*Křížkovský-strato kun domoj de estintaj kanonikaj rezidejoj*

la tuta komplekso de la monaĥejaj domoj al la Patrujscienca Muzeo Olomouc. En la sama spaco de iama kirko estas nun instalataj pli grandaj ekspozicioj.

Najbare troviĝas secesia edifico el 1915, servanta al Teatro de Muziko komune kun Muzeo de Arto. Du reliefoj sur la fronto memorigas, ke sur tiu ĉi loko staris ekde mezo de la 13-a jarcento ĝis fino de la 18 jarcento hospitalo, poste kadeta lernejo kaj malliberejo.




*Arĥiepiskopa Konsistorio sur la Episkopa Placo*

En la orienta parto de la placo ĝis 1839 staris gotika preĝejo de Virgulino Maria je Antaŭburgo (v Předhradí), konstruita komence de la 13-a jarcento. Sur ĝia loko nun troviĝas klasikisma edifico servanta por la urba biblioteko.

Post la najbara domo de poŝtoficejo, n-ro 1, ni eniras Křížkovský-straton, kies dekstran flankon borderas domoj de la estintaj kanonikaj rezidejoj. Ili prezentas preskaŭ kontinuan domvicon el la lasta triono de la 17-a jarcento kaj el la unua triono de la 18-a jarcento. Ili estas pluretaĝaj domblokoj kun korto. Super iliaj portaloj estas ŝtonaj blazonoj de la unuaj prepostaj, kanonikaj aŭ vikariaj loĝantoj. La rektorejo de la universitato, n-ro 8, estas lokita en frubaroka blok-edifico de la iama prepostejo. En la dua etaĝo de la malantaŭa domparto estas plafonfresko de Karel František Tepper.

Ekde 1946 por la universitato servas ankaŭ la domo n-ro 10, kies nuntempa aspekto devenas el 1903. Sur ĉi tiu loko jam en la 11-a jarcento staris la unua episkopa kirko de Sankta Petro. En 1141 la episkopa rezidejo estis translokita al la nove konstruita templo de Sankta Venceslao. La malnova kirko estis malkonstruita en 1792. Proksime troviĝas ankaŭ monaĥejo de aŭgustenaninoj kaj la kirko de Sankta Jakobo, malfondita en la fino de la 19-a jarcento.

Sur la kontraŭa flanko de Křížkovský-strato situas duetaĝa baroka domo de la pli frua Nobelara Akademio el 1725-1730. Konstruis ĝin kaj versimile ankaŭ projektis Jan Jakub Kniebandl.

Apud la angulo de la stratoj, nomitaj laŭ Křížkovský kaj Wurm, staras du sufiĉe grandaj kanonikaj rezidejoj el la baroka tempo. La domo n-ro 13 estas rezidejo de la Galerio de Belartoj kun konstantaj ekspozicioj de belartaj verkoj de Bohumír Dvorský, Vladimír Navrátil kaj Karel Svolinský.

En la domo n-ro 11 estas deponitaj dokumentaj, manuskriptaj kaj libraj fontoj havantaj sian signifon precipe por la eklezia historio de la olomouca regiono kaj administrataj de la Ŝtata regiona arkivo en Opava, filio en Olomouc.



*Theresia-arsenalo sur la Episkopa Placo*

Al la plej signifoplenaj objektoj de la frua baroko en Moravio apartenas la najbara arĥiepiskopa palaco, n-ro 9, rekonstruita en 1665-1685 el origina renesanca rezidejo laŭ projekto de la imperiestra arĥitekto Filip Albert Luches, de post 1668 laŭ adapto de G. P. Tencalla. La konstruon realigis Petr Schüler kaj Melchior Thoneck. La objekto konsistas el sep aloj ĉirkaŭ du kortoj, ĝia fronto kun tri portaloj estas riĉe pritraktita. En la dua etaĝo, en la solena salono, en 1848 Ferdinand la V-a abdikis favore por sia nevo, posta imperiestro Franz Josef la I-a.

Antaŭ la arĥiepiskopa palaco estas malgranda parko nomata Biskupské náměstí (Episkopa Placo) kun du historiaj objektoj. Unu estas edifico de iama Theresia-arsenalo konstruita antaŭ 1771. Ĝian funkcion simbolas soldataj kaj militaj motivoj sur la fronto super la ĉefa enirejo. Laŭ arĥeologia esploro, farita antaŭ nelonge en korto de la arsenalo, oni konkludis, ke la loko Předhradí (Antaŭburgo) - parto de Olomouc, estis prisetlita jam en la tempo de Grand-moravia regno.

En la kontraŭa flanko de la placo staras konstruaĵo de arĥiepiskopa konsistorio. La origina baroka edifico el 1681 estis grave konstrue ŝanĝita en 1908.

Najbare de la arĥiepiskopa palaco, ankoraŭ en Wurm-strato, staras domo n-ro 7, trietaĝa dombloko, kie oni studis filozofion de Tomaso Akvitana. La dorsa alo estas frubaroka el la dua duono de la 17-a jarcento, la flankaj aloj kaj la fronta alo estas finkonstruitaj ĉirkaŭ 1705. Sur la atiko de la palaco troviĝas ŝtonaj bustoj de imperiestroj. La angulan domon de Wurm-strato, n-ro 1, ornamas ŝtona memorplato memoriganta restadon de la kunfondinto de Patriota societo muzea, Ignác Wurm (1825-1911). Sur tiu ĉi loko staris Nový Hrádek (Nova Kasteleto), menciita jam en 1213, poste servanta kiel rezidejo de la landa tribunalo.

## VENCESLAA PLACO

Ni kruce trairos la straton de La 1-a de majo kaj ni eniros la straton Dómská (Katedralan) kaj poste la pitoreskan Venceslaan Placon, kie estas amasigitaj multaj valoraj kultur-historiaj monumentoj. Maldekstre en la ĝardena muro estas enkonstruita niĉo, en kiu troviĝas kopio de la reliefo de Virgulino Maria Protektantino. La originalo el 1480-aj jaroj, devenanta el la fronto de malfondita kirko de Virgulino Maria je Antaŭburgo, estas nuntempe lokita sur la altaro de la nova kanonika kapelo en la katedralo.



*La Venceslaa Placo kun novgotika metropolita katedralo de Sankta Venceslao kaj kapelo de Sankta Anna*

La veninto estas impresita precipe pro fortikeco de la novgotika rekonstruita metropolita katedralo de Sankta Venceslao. La originan romanikan bazilikon en tiu ĉi loko fondis antaŭ 1107 apanaĝa Premislida princo Svatopluk, konstruis ĝin lia filo Venceslao kaj finis la episkopo Zdík en la jaroj 1131-1141. La templo estis post incendioj kaj plafondetruoj ofte rekonstruata.



*Malfrurenesanca kapelo de Sankta Anna. Maldekstre cilindra kapelo de Sankta Barbara. Dekstre enirpordo en gotikan klostron el la 14-a jc.*

En la jaroj 1616-1618 konstruigis novan, frubarokan pastrejon František la kardinalo Ditrichŝtejn. La konstruaĵo, kvankam interne adaptita romantike, daŭre impresas forte. Fine de la 16-a jarcento oni al la suda flanko de la templo alkonstruis la renesancan kapelon de Sankta Stanislao, kies portalo estis samtempe kompletigita per bronza reliefa krado de alta art-nivelo. Ĉe flankoj de la kapela portalo estas enmetitaj valoraj renesancaj sarkofagoj. La metala apartenas al la denaska olomoucano, episkopo Marek Kuen kaj estis fabrikita en 1566 de Hans Straubinger. La alia marmora plastika plato el komenco de la 17-a jarcento prezentas la apanaĝajn princojn el la gento de Premislidoj. La katedralon ornamas ankaŭ la baroka Loreto-kapelo, alkonstruita al la suda flanko en la dua duono de la 17-a jarcento, ankaŭ la ĥorejaj benkoj el la 1680-aj jaroj. Sub la pastrejo estis en 1661 alkonstruita trinava baroka kripto, en kiu dum somera sezono okazadis ekspozicioj de valoraĵoj el la katedrala inventaro. Dum la regotikigo de la katedralo, efektivigita laŭ la planoj de la arĥitekto Gustav Maretta ekde 1883 kaj finita fare de Richard

Völkel en 1896, estis nove konstruita la fronto kun du turoj, sude turo alta 102 metrojn kaj norde kanonika kapelo. Laŭ la spirito de la novgotika romantikismo el la interno estis ekskludita la baroka inventaro kaj ĝi estis readaptita kaj rekolorigita.



*Turoj de la Katedralo de Sankta Venceslao*

Ekde 1973 ĝi estas interne restaŭrita, la katedrala navo provizita per krucvojo, verko de la skulptisto Karel Stádník, kaj muldita el stano fare de F. Radvan. Aldoniĝis la nova orgeno en la altarejo kaj la sonorilekipo, kies du dekoj da sonoriloj estis mulditaj fare de Leticie Dittrichová.

Al la norda flanko de la katedralo ligiĝas gotika klostro, konstruita meze de la 14-a jarcento, kun murpentraĵoj el dislimo de la 15-a kaj 16-a jarcentoj. La aŭtoreco de la pentraĵoj influitaj de grafiko de A. Dürer estas ĉiam objekto de ekzamenado de arthistoriistoj. Tra streta ŝtuparo de la klostro oni povas ascendi super ties volbon, kie en 1867 konstruisto Karel Biefel malkovris ŝtonan masonaĵon kun dek unu-, du- kaj tri-opaj romanikaj fenestroj pretigitaj el marno kun dekoro. Temis pri torso de romanika palaco, pri ĝia norda kaj okcidenta masonaĵo.

Tiu ĉi palaco, nomata Premislida, en 1962 estis registrita inter la naciajn kulturajn monumentojn. Fakuloj klasifikas ĝin al "la plej altsignifaj loĝaj arkitekturaĵoj de la kulmina romanika epoko en Eŭropo".

Ekde 1970-aj jaroj la palaco estis renovigata kun celo enirebligi ĝin al la publiko. Samtempe tamen ekspertoj diskutas pri la dato de ĝia ekesto, pri ĝia funkcia misio kaj pri la artistoj - ŝtonhakistoj, la verkintoj de la fenestra ornamo. Ili opinias, ke la konstruado de la romanika palaco estis komencita ĉirkaŭ 1141, en la tempo, kiam finiĝis konstruado de la preĝejo. La palaco servis al episkopo kaj al kapitulanoj kaj ĝian ornamadon partoprenis ŝtonhakistoj el Rejnlando.

Multe da neklara estas provizore pri la rezidejo de la apanaĝaj Premislidoj. Estas certe, ke jam en la 11-a jarcento ankoraŭ antaŭ konstruo de la episkopa katedralo de Sankta Venceslao la apanaĝaj princoj ĉi-loke havis sian burgon. Oni supozas, ke ĝi staris en la loko de iama kapitula dekanejo.

nordgermana skolo. La baroka stuka dekoro de la fenestraj frontonoj estas el komenco de la 18-a jarcento. La kvara etaĝo de la

Apud la romanika palaco estas cilindra defendoturo, nun la kapelo de Sankta Barbara, tegmentita per baroka "helmo" kun ronda lanterno. Laste ĝi estis interne riparita meze de la 17-a jarcento.

La katedrala klostro el la mezo de la 14-a jarcento, la gotika kapelo de Sankta Johano Baptisto alkonstruita al la klostro antaŭ la jaro 1440, la kapelo de Sankta Barbara kaj precipe la restaĵoj de masonaĵo de la romanika palaco prezentas unikan kultur-historian komplekson.

Al la Venceslaa Placo estas turnita ankaŭ la fronto de malfru-renesanca kapelo de Sankta Anna el 1617, en kiu ĝis 1916 okazadis balotoj de olomoucaj episkopoj kaj arĥiepiskopoj.

En la ĝardeno, apartigita disde la placo per forĝita barilo kaj enira pordego, staras edifico de pli frua dekanejo, frubaroka duala objekto el la mezo de la 17-a jarcento. Ĝi situas surloke de la malnova dekanejo kaj verŝajne ankaŭ princa burgo, kiu estis jam meze de la 13-a jarcento neloĝata. En 1306 estis tie ĉi murdita la lasta Premislido Venceslao la III-a okaze de sia militiro al Pollando.



*Krepuska vidaĵo de la katedrala konstru-komplekso*

La stuka ornamo de la ĉambro en la dua etaĝo estas el mezo de la 18-a jarcento. Interesa estas ankaŭ la t.n. "blazona salono" ornamita per blazonoj de la olomoucaj kanonikoj. Tabuloj, lokitaj sur la dekanejo, memorigas unue la tragikan morton de Venceslao la III-a, due la restadon de komponisto W. A. Mozart en 1767 kaj trie laborlokon de profesoro Bohumír Markalous-John en la katedro de estetiko de la Filozofia fakultato en 1946-1952.

Meze de la placo en 1724 estis starigita la statuo de Sankta Johano Nepomucena, atribuata al la skulptisto Jiří Antonín Heinz el Uničov.

Tra Mlčoch-strateto ni forlasas la Venceslaan Placon. En angulo de la strateto estas adaptita domo de eksa katedrala lernejo, kies komencon oni supozas en 1143. La episkopo Vilém el Prusinovice en la domo en 1566 postenigis jezuitojn, kiuj komencis instruadon en kvar klasoj de gimnazio.

## STRATO DE LA 8-A DE MAJO

Tra la strato de La 1-a de majo, tra la placo de Respubliko kaj Denis-strato ni venas al la strato de La 8-a de majo. Ĉi tie ni dediĉu atenton al la monumenta gotika trinava templo de Sankta Maŭrico.



*Gotika preĝejo de Sankta Maŭrico*

Ĝia konstruado estis komencita post 1398. Antaŭ 1403 estis finkonstruita la suda turo, en 1412 estis konstruita la norda turo, la fronta objekto kaj komencita la konstruado de la trinavo. La konstruado poste daŭrigis nur post la husanaj militoj. La trinavo finkonstruiĝis en 1435-1454, ĝian konstruadon kaj volbigon partoprenis la olomoucaj konstruistoj Jakš Parléř kaj Klaus el Aachen. Meze de la sama jarcento estiĝis la sabloŝtona statuaro de la Olivarba Monto, hodiaŭ lokita sub la ĥorejo. Volbigo de la altarejo estis finita ĉirkaŭ 1483. La tuta interno estis finaranĝita nur en la jaro 1540. El la jaro 1505 estas granda surmura fresko prezentanta la sanktulojn Laŭrencon, Sebaldon kaj Kristoforon, inter kiuj estis pentrita templo. Post la granda incendio en 1709, kiam forbrulis la tuta meblaro de la templo, estis pretigitaj la barokaj altaroj, la baroka ĥorejo kun la fama orgeno de la majstro Michael Engler el Wrocław, el la jaro 1745. La altaron kaj la orgenon skulpte ornamis Filip Settler. La nuna novgotika ĉefaltaro estas verko de Andreas Halbig el Würzburg, el 1861.

Al la norda ekstera flanko de la templo estis en 1572 alkonstruita renesanca kripto de la familio Edelmann, la posedintoj de la palaco sur la nuntempa Supra Placo. Ĝia fasado estas dekoraciita per figuraj reliefoj. Al la sama flanko estis alkonstruita la baroka kapelo de Virgulino Maria, la tombejo de la Petráš-familianoj, posedintoj ankaŭ de palaco sur la Supra Placo.

En 1972-1975, antaŭ konstruado de la magazeno PRIOR, ĉirkaŭ templo estis farita arkeologia esploro, ĉe kiu oni konstatis, ke la loko estis prisetlita jam ekde neolito kaj ankaŭ en la 10-a jarcento ĉi tie troviĝis setlejo. Estis pruvite ankaŭ, ke en la 11-a jarcento ĉi tie staris romanika rotondo kaj en la 15-a jarcento ĉirkaŭ la Maŭrica templo etendiĝis tombejo kun tri kapeloj. La lasta kapelo, nomata Moravia, estis malkonstruita en 1812. Proksime staris, ekde komenco de la 15-a jarcento, domo de urba lernejo, nomata Maŭrica, kiu estis en la tempo de reformacio en la manoj de nekatolikoj kaj konkuris kun la katolika katedrala lernejo.



*Akvofontano Merkuro antaŭ novrenesanca palaco Nacia Domo*

Proksime al vojkruciĝo staras la fontano de Merkuro, unu el ses fontanoj de la urbo, kiu estas arte la plej valora. La statuon faris kunlabore kun Václav Render la juna artisto Filip Sattler en 1727.

Ĉe angulo de la strato La 8-a de majo kaj Slovenská-strato (Slovaka strato) staras novrenesanca palaco de la Nacia domo, konstruita en 1887-1888 sur loko de ses malpli novaj objektoj. Ĝia halo, salonetoj, hotelaj kaj restoraciaj ejoj estis ĝis 1918 centro de la tuta kultura kaj socia vivo de la ĉeĥa urbanaro en Olomouc.

Tra Slovenská-strato ni venas al estinta monaĥejo de bernardanoj, en kiu de post 1785 loĝas dominikanoj. Tuŝapudas ĝin la preĝejo de Senmakula Koncipiĝo de Virgulino Maria, konstruita en 1454-1468. La malfrugotika trinava preĝejo estas tegmentita per sepedra piramida tegmento. Interne de la preĝejo estas grandarea fresko de Virgulino Maria

Rozaria el 1500. Fragmentoj de pluaj gotikaj pentraĵoj estis malkovritaj ĉe murfarbado de la templo en 1983.

La kapelo, kiu estas alkonstruita al la suda flanko de la pastrejo, devenas el 1653. Ĝi estas imitaĵo de la jerusalema Dia tombo. En la 18-a jarcento estis ankaŭ al la suda flanko alkonstruita, sur ovala planareo, baroka kapelo nomata Rozaria.

En la monaĥejo, rekonstruita en la baroka stilo, konserviĝis parto de malfrugotika klostro. Al la monaĥejo apartenas preĝejo kun kapelo ene kun sanktaj ŝtupoj konstruitaj en 1702. Ornamo de la interno rememorigas la scenon de Kristo antaŭ Pilato kun ŝtuparo en lia palaco.



*Dominikana preĝejo de Senmakula Koncipiĝo de la Virgulino Maria*

---

En ĉi tiu loko fermiĝas la trarigardo de la plej signifaj historiaj, konstruaj kaj valoraj kulturaj monumentoj de la urbo Olomouc.

Kelkaj gastoj de la urbo vizitos la olomoucajn parkojn kaj ĝardenojn, kiuj ringe ĉirkaŭas la historian kernon kaj kiuj estas ekde 1958 okazejo de ekspozicioj pri dekora hortikulturo FLORA Olomouc. Aliaj veturos per la urba bustrafiko en la nuntempan antaŭurbon Svatý Kopeček (Sankta Monteto) por rigardi la tiean barokan templon kaj viziti la zoologian ĝardenon, fonditan sur parceloj de konifer-arbaro kaj malfermitan en 1956. Per urba buslinio eblas atingi ankaŭ vastan komplekson de la estinta premonstrata monaĥejo Hradisko (Opidumo).



*Konstrukomplekso de la dominikana klostro*

## SVATÝ KOPEČEK

La civito Svatý Kopeček (Sankta Monteto), alligita al Olomouc dum la teritoria reorganizo en 1974, situas en alto 382 m super maro sur arbarumita montarlango de Nízký Jeseník.

De malproksime videbla dominanto de la montarlango estas la baroka templo de Vizito de la Virgulino Maria, konstruita de la premonstratoj en Hradisko sur loko de pilgrima kapelo el 1669 -1679 laŭ planoj de la arĥitekto Giovanni Pietro Tencala kaj priĉigita je konstruo de du aloj de rezidejoj, farita en 1714 -1721 laŭ la projekto de Domeniko Martinelli. La ĉefa navo estas krucigita per transversa navo. Meze de la kruciĝo estis konstruita grandioza kupolo. Sur fronto de la templo troveblas riĉa portalo kun statuoj de tri virtoj, sur atikoj de la aloj statuoj de dek apostoloj kaj du protektantoj kontraŭ pesto, ĉio fare de la fratoj Josef kaj Antonín Winterhalder.



*Svatý Kopeček - preĝejo de Vizito de V. Maria*

Riĉega estas la stuka kaj freska ornamo de la volboj en pastrejo, navo, ankaŭ en la flankaj kapeloj el la 1960-aj jaroj. Aŭtoro de pliparto de la plafonaj freskoj estas Jan Steger. La alegoriojn de kvar kontinentoj en sektoroj sub la kupolo en 1730 pentris Jan Krištof Handke. Ankaŭ la altarbildoj estas verkoj de altsignifaj pentristoj. De Jan Spillenberger - la ĉefa altarbildo el 1677 - de Frans de Neve, Tobias Pock, Pavel Troger k.a. Por kronado de la votbildo en 1732 estis interno de la templo renovigita kaj ornamita laŭ koncepto de Baltazar Fontana. Li mem estas aŭtoro de la plastikaĵoj sur kornicoj de la interno, super la ĉefa altaro kaj en la flankaj kapeloj. La cizelaĵojn en arĝento faris Mikuláš Indegrenz el Kroměříž kaj Wolfgang Rossmayer el Olomouc. La orgenon konstruis en la unua kvarono de la 18-a jarcento David Sieber kaj Antonín Richter kaj plastike ĝin riĉe ornamis la lignoskulptisto Jan Sturmer.
Projektojn de la klostroj kaj de la kapelo konsekrita al la Nomo de Virgulino Maria, malantaŭ la templo, ellaboris Domenico Martinelli, la konstruado estis finita en 1719. La kupolvolbon de la kapelo dekoraciis per vasta fresko Jan Kryštof Handke. Meze de la korto troviĝas statuo de Sankta Norberto, matura verko de la fratoj Josef kaj Antonín Winterhalder el 1753.

## MONAĤEJO HRADISKO (OPIDUMO)

Sur nealta monteto ĉe la norda rando de Olomouc, sur la maldekstra bordo de la rivero Morava, situas grandega kvadrata komplekso de la monaĥejo Hradisko, loĝata ĝis 1784 de premonstratoj. La monaĥejo fondita en 1078 de Premislido Oto la I-a kaj lia edzino Eufemia por benediktanoj estis en 1151 transdonita al premonstratoj el Strahov.



*Grandega komplekso de la monaĥejo Hradisko*

La monaĥejo estis kelkfoje malkonstruita kaj ree konstruita. Ĝia nuntempa aspekto estiĝadis poŝtupe en la jaroj 1659-1750. En la vico ĝi jam estas la sepa konstruŝtupo. La fronto kaj la flankaj aloj prezentas proksimume 100-metran longon. Interne etendiĝas tri malgrandaj kortoj kaj unu granda kortego. Al la objekto dominas la meza kvardek metrojn alta templa turo. Ties origina baroka tegmenta finaĵo forbrulis okaze de incendio en 1787. Impresa arĥitektura elemento estas kvar angulaj sesedraj turoj finitaj per bulbaj kupoloj. Post la komenca spontana konstruado estis iom poste komisiita per prilaboro de kompleta projekto la konata arĥitekto Giovanni Pietro Tencala. Fine de la 17-a jarcento la koncepton de Tencala parte relaboris kaj ŝanĝetis la viena arĥitekto Domenico Martinelli. Aŭtoro de projekto de la prelata kapelo de Sankta Stefano, tuŝanta la orientan alon de la monaĥejo, kaj konstruata en 1726-1731, estas nekonata. Oni konjektas pri nerekta partopreno de Jan Blažej Santini aŭ Kilián Ignác Dienzenhofer. Hodiaŭ estas la kapelo paroĥa kirko.

Dum longjara konstruado de la unuopaj aloj de la monaĥejo ĉi tie alternis kelkaj majstroj: Matěj Partsch, Adam Glöcki, Jan Mathis, Christian Oedt, Carlo Reyna kaj Wolfgang Reich. Arĥitekture plej valora estas la fronta alo konstruata ekde 1726. Ĝian frontŝtupon formas prelatejo kun granda portalo kaj kolonaro. Sur la fronta atiko staras sep statuoj. La alegorion de kvar jarsezonoj en la vestiblo de prelatejo skulptis Jiří Antonín Heinz en la jaroj 1731-1732. La solena halo de la prelatejo en la dua etaĝo de la fronta alo prezen-tas veran artisman juvelon. Ĝi estas ornamita per plafona fresko de Pavel Troger el 1731, per unikaj plastikaĵoj de Josef Winterhalder, lokfiksitaj en niĉon en 1725, reliefaj stukaj de-koraĵoj de Baltazar Fontana, Antonín Ricci kaj Jan Hagenmüller. Imprese estas ekipita

ankaŭ la spaco en la dua etaĝo antaŭ la solena halo. Ankaŭ la biblioteka salono havas la plafonon dekoritan, nome per freskoj de Inocenc Kryštof Monti kaj per stuko de Baltazar Fontana, ĉio el komenco de la 18-a jarcento.



*Fronta flanko de la monaĥejo Hradisko*

Josef Winterhalder estas aŭtoro de la statuaro de Sankta Johano Nepomucena, kiu estis konstruita en 1737 ĉe la centra portalo. En la monaĥejo, malfondita fare de Josef la II-a en 1784, estis establita ĝenerala seminario por eduko de pastroj, en 1787-1790 laborejo de la fondinto de slavistiko Josef Dobrovský. Nuntempe la tuta komplekso servas al hospitalaj servoj.

## LA NOVA OLOMOUC

La historian centron de la urbo Olomouc ĉirkaŭas ne nur riĉa ringo de parkoj kaj verdaĵo, sed ankaŭ modernaj kvartaloj kun pluretaĝaj domoj. En 1945 estis en la urbo 17823 loĝejoj, en kiuj loĝis 58178 loĝantoj, dum sesdek jaroj 1945-2005 atingis la loĝejoj nombron preskaŭ de 40 mil, en kiuj en la jaro 2005 loĝis ĉirkaŭ 102 mil loĝantoj. Plurajn novajn loĝdomarojn oni konstruis precipe en okcidenta, suda kaj norda partoj de Olomouc. En la orientan parton de la urbo estis situigita konstruado de industriaj entreprenoj. La masona teĥnologio estis anstataŭigita per la panela. Al arĥitektoj estis fiksitaj malfacilaj taskoj. Krome estis necese lokigi novajn loĝdomarojn en la teritorion akorde kun la urboplano kaj atenti historie valoran urbocentron. Al dominantoj de la urbo Olomouc el jarcentoj pasintaj aliĝis dominantoj novaj.

## REGIONO DE OLOMOUC

La administra regiono estas limigita per teritorioj de la distriktoj Jeseník, Olomouc, Prostějov, Přerov kaj Šumperk. Ĝi okupas areon 5267 km$^2$ kaj administras ĝin 13 subregionaj komunumaj centroj kun vastigita jurpovo. En la olomouca regiono loĝas kaj vivas 640680 loĝantoj.

La olomouca regiono taŭgas por homoj ŝatantaj turismon, kiuj emas ekskursi bicikle, interesiĝas pri historiaj monumentoj, memorindaĵoj kaj naturaj fenomenoj. La plej signifoplena laŭ etnografia vidpunkto estas la subregiono Haná. Por turismo kaj ripozo en arbara regiono estas konvena la montara regiono Jeseníky, ankaŭ la restado en tieaj balneologiaj centroj.


Por interesatoj pri historio estas malfermitaj abundaj kasteloj, ruinoj de burgoj kaj muzeoj.



*Kastelo Bouzov*

## BANLOKOJ

**Banloko Jeseník** troviĝas du kilometrojn de la urbo Jeseník en alteco de 620 metroj super maro. Mondfama estas la fondinto de hidroterapio - Vincenz Priessnitz, kiu komencis kuracadon helpe de malvarma minerala akvo en la jaro 1822 kiel la unua kuracisto en la historio. Proksime de la banloko elfluas 80 neregistritaj fontoj de minerala akvo.




*Banloko de Priessnitz en Jeseník*

**Banloko Lipová** - klimata banloko.

**Velké Losiny** - la civito ekestis en la jaro 1351. Manufakturo kun permana fabrikado de papero funkcias ĝis nun. La natura papero estas uzata por rekonstruo de historiaj dokumentoj kaj aliaj valoraĵoj. La banloko apartenas al la plej malnovaj kuracaj lokoj en Moravio - konata ĝi estas jam ekde la 16-a jarcento. De tiu tempo ĝi estis riĉe vizitata.

**Bludov** - la mineralaj fontoj estas konataj ekde la 12-a jarcento, sed por kuracado ili estas utiligataj per radioaktiva akvo ekde 1929.



*Banloko kaj kastelo en Velké Losiny*

**Banloko Teplice nad Bečvou** kuracas kormalsanojn helpe de minerala akvo, enhavanta kalcian kaj magnezian hidrogenkarbonatojn kun enhavo de fero. En la banloko estas ankaŭ riĉa areo de aragonitaj grotoj.

**Skalka** - la loko enhavas alkalan sulfidan mineralan akvon. Skalka troviĝas 10 kilometrojn sudoriente de la urbo Prostějov.

**Slatinice** - sulfidaj mineralaj akvoj.



*Banloko Teplice nad Bečvou*

## Proponoj por ekskursoj:

Baziliko minora Svatý Kopeček (Sankta Monteto). Natura paradizo Horizonto - kolekto de arboj, arbustoj, botanika plantaro apud la vilaĝo Bystrovany. Ŝirmata Natura Teritorio (CHKO) estas pejzaĝo apud la rivero Morava, proksime de la urbo Litovel. Duonruino de la kastelo Helfštýn, la kasteloj kaj burgoj Šternberk, Bouzov, Sovinec, la nobel-domegoj Náměšť na Hané kaj Jánský Vrch, la nobeldomego kaj valbaraĵo Plumlov. "Ecce homo" - la surŝosea aŭtomobila vetkuro - en la jaro 2005 solenas jam la centan jubileon ktp.



*Aragonitaj grotoj de Zbrašov*

## NATURSCIENCAJ INTERESAĴOJ

**Arboretum Bílá Lhota** - parko ekzistanta ekde 1700, kiam ĝi estis fondita okaze de renovigo de kasteleto. Riĉe provizita per alilandaj, nesufiĉe konataj arboj, arbedoj, arbustoj kaj ankaŭ ne por ĉiuj konata plantaro.

**Javořičské jeskyně** - 3,5 kilometrojn longaj grotaj koridoroj kun stalagmitoj, stalaktitoj kaj stalagnatoj, la plej belaj en nia lando.

**Mladečské jeskyně** - grotoj proksimaj al la grotoj Javořičské. Tie troviĝas eksterordinare grava paleontologia kaj arĥeologia trovejo.




*Arboretum en Bílá Lhota*

**Zbrašovské aragonitové jeskyně** - aragonitaj grotoj ligitaj kun la banloko Teplice nad Bečvou, 4 kilometrojn sude de la urbo Hranice, atingeblaj per urba bustrafiko, ankaŭ per trajno en la direkto al Valašské Meziříčí. Fontoj de varma minerala akvo varmigas grotojn je konstanta temperaturo 14,5 Co. Ĉi tie estas la plej varmaj grotoj en nia lando.

**Jeskyně na Pomezí** - apud la norda limo de Moravio kaj Pollando - grotoj havantaj la plej vastan grotan sistemon estiĝintan per solvado de marmoro.

**Jeskyně na Špičáku** - grotoj en norda Moravio - skriba informo pri ili datiĝas jam en la jaro 1430.



*Permana fabrikejo de papero en Velké Losiny*

## MUZEOJ

- Muzeo en la naturo de la subdistrikto Haná en Příkazy.
- Muzeo de fromaĝetoj en Loštice.
- Muzeo de permana paperproduktado en Velké Losiny.
- Muzeo de muelado de orhava minaĵo en Zlaté Hory.
- Muzeo de mamutoj en Přerov.
- Auto-motorcikla veterana muzeo en Česká Ves.
- Agrikultura muzeo en naturo en Rapotín.




*Muzeo de papero en Velké Losiny*

- Multaj aliaj muzeoj - en Prostějov, Šumperk, Jeseník, Zábřeh Úsov (lovecko-lesnické muzeum - ĉasa-forsta muzeo), Mohelnice, Javorník, Hranice, Čechy pod Kosířem (hasičské muzeum - estingista muzeo), Uničov.

## ĜEMELAJ REGIONOJ DE LA REGIONO OLOMOUC

**Regiono Vejle - Dana Reĝolando**

Spaco de regiono - 2997 $km^2$

Loĝantaro - 350 mil

**Provinco Regio Emilia - Itala Respubliko**

Spaco de regiono - 2292 $km^2$

Loĝantaro - 468 mil

**Vojevodio de Opole - Pola Popola Respubliko**

Spaco de regiono - 9412 $km^2$

Loĝantaro - 1100 mil

**Departemento Baranya - Hungara Respubliko**

Spaco de regiono - 4430 $km^2$

Loĝantaro - 401 mil

**Departemento Würzburg - Federacia Respubliko Germanio**

Spaco de regiono - 968 $km^2$

Loĝantaro - 159 mil

**Aŭtonomia distrikto Vojvodina - Serbio**

Spaco de regiono - 21 506 $km^2$

Loĝantaro - 2 milionoj

**Departemento Kostrom - Rusa Federacio**


Spaco de regiono - 60 mil $km^2$

Loĝantaro - 766 mil

La regiono Olomouc ekde ekesto komencas kontaktiĝi kaj evolui internacian kunlaboron kune kun eksterlandaj regionoj je spertoj, ideoj kun eblo ligi kulturajn kaj ekonomiajn interŝanĝojn de kontaktoj.


**Olomouc - urba rezervejo de monumentoj**

Aŭtoro : Kolektivo de Esperanto-Klubo en urbo Olomouc
Lingva korekto: Inĝeniero Jan Werner
Grafika aranĝo: Miloslav Šváček
Fina kontrolo: Miloslav Pastrňák
Fotoj: Membroj de loka Esperanto-Klubo
Eldonita per ekonomia helpo de urba kaj distrikta registaroj
Unua eldono, jaro 2006



OLOMOUC
směr Šternberk
směr Hradec Králové
směr Ostrava
směr Brno
směr Přerov
Morava
SVATÝ KOPEČEK
KLÁŠTERNÍ HRADISKO
14
12
46
635
448
570
435
436
437
E462
E442
R35
STADION
ANDRŮV STADION
TENIS
HÁZENÁ
Legionářská
Lazecká
Na Struze
Vlkova
Boleslavova
Bořivojova
Helceletova
Kubíčkova
U Stadionu
Husův sbor
U Husova sboru
STÁTNÍ ARCHIV
Na Střelnici
Dobrovského
Studentská
Franklinova
Kozelužská
Hanáckého Pluku
Pekární
Mlčochova
Dómská
Václavské náměstí
katedrála sv. Václava
sv. Anna
Biskupství a kapitula
1
2
Komenského
1. máje
OVS
Sokolská
Zámečnická
Neposkvrn. poč. P. Marie
13
Slovenská
U Hradeb
náměstí Národních hrdinů
8. května
Pekařská
Vodární
Kačení
Denisova
náměstí Republiky
Mariánská
Akademická
3
Biskupské náměstí
Arcibiskupství
4
Kosinova
Nábř. Přemyslovců
Žižkovo nám.
Jiřího z Poděbrad
Wurmova
Křížkovského
P. Maria Sněžná
5
kaple Božího těla
Univerzitní náměstí
Univerzitní
6
Bezručovy sady
Ostružnická
Zlatená
Mahlerova
7
Michalská
Na Hradě
sv. Michal
8
Žerotínovo náměstí
sv. Alexeje
Kollárovo náměstí
Riegrova
28. října
sv. Mořic
11
Úzká
Opletalova
MMO
Horní náměstí
10
9
Barvířská
Mlýnská
Švédská
Divadelní
Školní
Tř. Spojenců
Vančurova
Bezručova
Tylova
Dánská
Třída Svobody
Švermova
OKRESNÍ A KRAJSKÝ SOUD
Havlíčkova
Pavelčákova
Uhelná
Panská
Purkrabská
Kozí
Kapucínská
Hrnčířská
Dolní náměstí
Lafayetova
Zvěstování p. Marie
Blažejské
Palachovo
U Reálky
TENIS
STÁTNÍ ZASTUPITELS
17. listopadu
Šmeralova

# REGIONO DE OLOMOUC




La administra regiono estas limigita per teritorioj de la distriktoj Jeseník, Olomouc, Prostějov, Přerov kaj Šumperk. Ĝi okupas areon 5267 km$^2$ kaj administras ĝin 13 subregionaj komunumaj centroj kun vastigita jurpovo. En la olomouca regiono loĝas kaj vivas 640680 loĝantoj.


La olomouca regiono taŭgas por homoj ŝatantaj turismon, kiuj emas ekskursi bicikle, interesiĝas pri historiaj monumentoj, memorindaĵoj kaj naturaj fenomenoj. La plej signifoplena laŭ etnografia vidpunkto estas la subregiono Haná. Por turismo kaj ripozo en arbara regiono estas konvena la montara regiono Jeseníky, ankaŭ la restado en tieaj balneologiaj centroj.

Por interesatoj pri historio estas malfermitaj abundaj kasteloj, ruinoj de burgoj kaj muzeoj.


# OLOMOUC BAROKA PERLO DE MORAVIO

OLOMOUC










Olomouc apartenas al la plej gravaj centroj en Ĉeĥa Respubliko. Danke al sia riĉa historio, antikva universitato, kulturaj kaj metiaj tradicioj, sed antaŭ ĉio pro sia centra situo kadre de Moravio, ĝi estis ĉiam alloga loko por turistoj, komercistoj kaj entreprenistoj.

Pli ol 900-jara historio de la urbo faras el Olomouc unu el la plej grandaj monument-juveloj de Ĉeĥa Respubliko. La urbo – post Prago la dua plej granda historia monumentrezervejo en ĈR, disponigas al siaj vizitantoj multajn eblojn, kiel utiligi sian ĉi-tiean restadon laŭ societa kaj kultura flankoj.

La monumentoj, inter kiujn apartenas ekz. Statuaro de Plejsankta Triunuo – ekde la jaro 2000 enskribita en Monumentliston de UNESCO, la urbodomo kun Astronomia Horloĝo, barokaj fontanoj, la nova sepa Fontano de Arion, Ĉefepiskopa Palaco, pluaj gravaj preĝejoj, klostroj aŭ la Baziliko Minora sur Svatý Kopeček – en la jaro 1995 altigita je baziliko fare de Papo Johano Paŭlo la Dua, certe alparolos ankaŭ la hodiaŭajn vizitantojn de la urbo.

## OLOMOUC REGION CARD




Ekkonu Olomouc helpe de turista permanenta bileto kaj utiligu rabatojn kaj senpagajn vizitojn de pli ol 90 objektoj, kiujn al vi la bileto proponas.

Pliajn informojn disponigos www.olomouc-tourism.cz

**Pliajn informojn pri la urbo kaj regiono disponigos al vi:**

i INFORMA CENTREJO DE LA URBO OLOMOUC

placo Horní náměstí – urbodomo, 771 27 Olomouc, tel.: +420 585 513 385, 585 913 467, fax: +420 585 220 843, e-mail: infocentrum@olomouc-tourism.cz, http: www.olomouc-tourism.cz
Malfermita: ĉiutage 9.00 – 19.00 h





